Itala Fervojisto



Il Ferroviere Italiano



2019 / 06 (1)



Il manifesto commemorativo del 110° anniversario della fondazione dell'I.F.E.F.

La elvokiva afiŝo de la 110-a datreveno de la I.F.E.F.-fondo.

Informa Bulteno (por la disvastigo de Esperanto)

Bollettino di Informazione (per la diffusione della lingua internazionale Esperanto)

Quote - Materiali	€
IFEA/IFEF (tutti)	25,00
FEI (ordinario)	30,00
FEI (giovane o familiare)	15,00
DLF (Effettivo, in servizio o pensione)	12,00
DLF (Aderente = familiare)	12,00
DLF (Giovane)	6,00
DLF (Frequentatore)	17,00
Circolo Culturale Gruppo E-o Bologna	8,00
Lessico Ferroviario RailLex	*8,00*
Historio de la Fervojista E.o-Movado	*3,00*
Historio de IFEF 1909-1984	*3,00*
Suplemento al Historio 1984-1999	*3,00*
NomListoj el la Historia broŝuroj	*2,50*
Statuto kaj Regularo IFEF	*1,50*
Catalogo Fondo Librario BO	*4,00*
L'E-o in Emilia Romagna	*7,00*
Ĉu vi deziras korespondi?	*1,00*
Uzo-pretaj korespondaj frazoj	*1,50*
Vivo kaj morto de monunuo	*1,50*
Introduzione alla conoscenza dell'E.o	*3,00*
Distintivi *IFEF Insignoj*	*2,50*

Prezzi, comprese spese postali.
Per 3 copie: il prezzo è di 2.
Rivolgersi a Bolognesi Romano:

✉ Via Misa 4, IT-40139 Bologna BO,
☎ ++39 051 547 247,
💻 < bolognesiromano@alice.it >

La legantoj estas varme invitataj kunlabori per artikoloj, informoj, sugestoj.

La Redakcio

I lettori sono invitati a collaborare inviando articoli, notizie, suggerimenti.

La Redazione

Attenzione: la quota 2019 resta a **25,00** €.
I morosi 2018 versino per i 2 anni 50,00 €.
L'ultimo anno pagato compare sull'invio.
Vedere a lato le possibilità di adesioni e le offerte di pubblicazioni o varie altre cose.
Attenzione: il N-ro Conto Corrente Bancario del Segretario IFEA è il seguente:

Vito Tornillo c/o Banca INTESA Zola Predosa (BO)

IBAN IT 31 U 03069 37133 100000001497

Rinnovate subito la quota:
l'IFEA potrà così meglio programmare e operare.
Segnalate sempre:
causale, cambio di dati e di indirizzo!

Fate iscrivere un collega, un familiare, un amico, un samideano: dobbiamo crescere in qualità, ma anche in quantità. La Kasisto

Enhavo

Temoj	*Paĝo*
Quote - Materiali / *Enhavo*	*2*
Note di redazione ...	*3*
Altaj Rapidaj Varoj. - Mercitalia Rapida *Merci Alta Velocità - Mercitalia Veloce*	*4* *5*
FS Italaj, Alta Rapido festas 10 jarojn *FS Italiana, l'Alta Velocità festeggia 10 anni*	*6* *6*
Italo EVO / *Italo EVO*	*7/8*
Esperanto en universitatoj, fruktoj de modela kunlaboro *Esperanto in università, frutti di una collaborazione modello*	*9* *10*
Trieste: ekis intermodala servo De Cervignano al baltaj havenoj *Trieste: al via il servizio intermodale da Cervignano ai porti del Baltico*	*11* *12*
Triobla kongreso okazis en Malago, Hispanio *Un triplo congresso si è tenuto a Malaga, Spagna*	*13* *15*
Vita dell'IFEA	*17*
Chi per primo … ? / *Kiu unue … ?*	*18*
Anekdotoj	*21*
Rimaĵoj	*24*
Diversaĵoj	*26*
Humuraĵoj	*29*
Proverboj	*33*
Aforismoj pri lingvoj	*34*
Gioco di parole / *Vortludo*	*35*
Kolofono // Leggere l'E-o	*36*

Alcuni articoli e foto liberamente presi da Internet.

Note di redazione...

Cari *samideani,*
all'inizio di questo numero trovate una descrizione di un nuovo sistema di consegna rapida delle merci proposto dalle FS. Un ETR.500 di 12 vagoni è stato attrezzato per trasportare contenitori su ruote, facili e veloci da caricare, scaricare e stivare.
La riproduzione della copertina (Luglio-Agosto 2019) della rivista Esperanto della UEA è stata dedicata ai partecipanti al congresso dell'IFEF a Malaga. Una attenzione verso la nostra categoria che è ben gradito, in quanto certo meritato, anche se non sempre viene sufficientemente evidenziato.
Segue una nota commemorativa per ricordare i 10 anni dell'introduzione dell'Alta Velocità in Italia, tesa a rilanciare l'uso del treno in una società sempre protesa ad accorciare i tempi di percorrenza. Vengono messe in risalto diverse ricadute meno invasive e inquinanti dell'AV sull'ambiente e la sua forte spinta economica propulsiva.
Anche il treno EVO di Italo mostra che l'orientamento delle industrie votate ai sempre più moderni e rapidi sistemi di trasporto intende rilanciare e potenziare la viabilità su sede propria proponendo materiali sempre più confortevoli e perciò allettanti.
Il successivo articolo evidenzia nuove opportunità di utilizzo dell'Esperanto anche nelle università, un cammino certo lento, non sempre capito o incoraggiato, ma che gli esperantisti, ben consci del valore ideale ed etico della Lingua Internazionale, non cesserà, fino a fornire e raggiungere i frutti auspicati.
Le notizie circa il servizio Intermodale da Cervignano ai porti del Baltico sono un esempio ulteriore del buon utilizzo del mezzo ferroviario. Il nuovo collegamento intermodale toglierà dalla strada circa 200 camion a settimana, a vantaggio della sostenibilità ambientale.
Ecco anche una breve cronaca del particolare triplo congresso tenuto a Malaga, Spagna, organizzato in contemporanea e massima collaborazione fra l'IFEF e le federazioni esperantiste spagnola e andalusa. Un tipo di collaborazione fruttuosa e auspicabile anche per il futuro.
Come sempre c'è l'invito a riflettere, durante qualche breve momento di questa frenetica vita, sui proverbi, gli aforismi, le curiosità più diverse. Per elevare lo spirito ci sono poesie e per tenere alto … il morale le battute e le vignette.
Questa mescolanza di generi raccoglie consensi perché anche così si dà un'ulteriore prova della grande capacità e duttilità dell'Esperanto nel rendere lo spirito di diversi dialetti, lingue e culture.
Approfondiamo ed esercitiamo sempre la nostra bella lingua utilizzando i più vari materiali.
Ci sforziamo di accontentare tanti gusti e di mantenere il giusto equilibrio. Però sono sempre graditi i consigli. □ (*RoBo*)



Altaj Rapidaj Varoj. - Mercitalia Rapida.

Varoj transportataj je alta rapideco uzante la italan AV-AK-reton. *Mercitalia Fast* estas la nomo de la nova kargoservo proponita de la kompanio *Ferrovie dello Stato Italiane*.

Por la okazo, ETR.500 el 12 vagonoj estis ekipita por transporti rulkontenerojn (70x80x180 1m^3 /220 kg), facilajn kaj rapidajn por ŝargi, malŝarĝi kaj stoki, por klientoj kiel ekspreskurieroj, loĝistikaj operatoroj, fabrikistoj, distribuistoj kaj taksistoj de nemoveblaĵoj.

Ekde merkredo 07/11/2018 ĝi komenciĝis per la kunligo Caserta - Bologna.

En la estonto oni planas etendi la oferton ĉe aliaj terminaloj en la ĉefaj italaj urboj tuŝitaj de la AV-AK-reto: Torino, Novara, Milano, Brescia, Verono, Padovo, Romo kaj Bari.

Mercitalia Fast funkcias per paro da trajnoj inter la terminaloj *Caserta Marcianise* kaj *Bologna Interporto* en 3h 20' je meza rapido de 180 km/h, kun transportkapacito egala al 18 kamionoj aŭ 2 *Boeing 747 Cargo*.

De la sudo la foriro okazas je la 20.50 kun atendata alveno en Bolonjo je la 0.10; en la kontraŭa direkto ĝi komenciĝas de Bolonja Interporto je la 2.50 kaj alvenas en Marcianise je la 6.10.

La horaroj estis planitaj por permesi la samtempan necesan noktan bontenadon de la infrastrukturoj.

Nun kun la nova servo *Mercitalia Fast* la reto pri Alta Rapido/Alta Kapacito estas uzata ankaŭ por vara transporto.

La celo estas proponi specialan servon al klientoj, kiuj devas liveri varojn rapide, fidinde kaj ĝustatempe.

Hodiaŭ ĝi estas la sola fervoja kompanio kiu povas garantii ĉi tiun servon.

En sia unua aktivada jaro, *Mercitalia* atingis la planizitajn ekonomiajn kaj industriajn rezultojn, kaj pri investoj faritaj kaj rilate al la celoj indikitaj en la 2017-2026 Komerca Plano.

Tial, relanĉiĝis la sektoro pri varoj kaj loĝistiko en Italio kaj eksterlande.

Fakte, 500 milionoj da eŭroj jam estis investitaj el la sumo de 1,5 miliardoj da eŭroj antaŭviditaj fare de la 2017-2026 Komerca Plano, dum, por la unua fojo en la historio de la vara sektoro de la italaj fervojoj, monaj fluoj estis pozitive generitaj en 2017 por 40 milionoj da eŭroj. □ *ViTo*



ETR.500 livreaĵo por la servo Mercitalia Fast. *Livrea dell'ETR.500 per il servizio Mercitalia Fast.*

Merci Alta Velocità - *Mercitalia Fast.*

Merci trasportate ad alta velocità utilizzando la rete AV/AC italiana. Si chiama *Mercitalia Fast* il nuovo servizio *cargo all freight* offerto dalla società del *Gruppo Ferrovie dello Stato Italiane*.

Per l'occasione un ETR.500 di 12 vagoni è stato attrezzato per trasportare contenitori su ruote (70x80x180 1m^3/220 kg), facili e veloci da caricare, scaricare e stivare per clienti come corrieri espresso, operatori logistici, produttori, distributori e valorizzatori immobiliari.

Da mercoledì 07/11/2018 è iniziato con il collegamento Caserta - Bologna.

Presto è prevista l'offerta anche per altri terminal delle principali città italiane toccate dalla rete AV/AC: Torino, Novara, Milano, Brescia, Verona, Padova, Roma e Bari.

Mercitalia Fast è operativo con una coppia di treni tra i Terminal Caserta Marcianise e Bologna Interporto in 3h 20' ad una media di 180 km/h, con una capacità di trasporto uguale a 18 *TIR* o a 2 *Boeing 747 Cargo*.

Da sud la partenza avviene alle 20.50 con arrivo previsto a Bologna alle 0.10; in senso inverso parte da Bologna Interporto alle 2.50 e arriva a Marcianise alle 6.10.

Gli orari sono stati studiati in modo da consentire al contempo la indispensabile manutenzione notturna delle infrastrutture.

Con il nuovo servizio *Mercitalia Fast* la rete Alta Velocità/Alta Capacità viene utilizzata anche per il trasporto merci.

L'obiettivo è offrire un servizio su misura ai clienti che devono consegnare la merce in modo rapido, affidabile e puntuale.

Oggi essa è l'unica impresa ferroviaria a poter garantire questo servizio.

Nel suo primo anno di attività *Mercitalia* ha centrato i risultati economici e industriali pianificati, sia in termini di investimenti effettuati sia per quanto riguarda gli obiettivi indicati nel Piano industriale 2017-2026.

Per questo motivo si è dato avvio al rilancio del settore merci e logistico in Italia e all'estero.

Sono già stati investiti infatti 500 milioni di euro su un totale di 1,5 miliardi di euro previsti dal Piano Industriale 2017-2026, mentre, per la prima volta nella storia del settore merci delle Ferrovie italiane, nel 2017 sono stati generati flussi di cassa positivi per 40 milioni di euro. □

ViTo



FS Italaj, Alta Rapido festas 10 jarojn

La itala alta rapideco, la infrastrukturo, kiu ŝanĝis la fervojan transporton de la lando, havas 10 jarojn.
Alta Rapido/Alta Kapacito estas la plej granda infrastruktura vorko farita en Italio dum la postmilita periodo, kune kun la A1 Milano-Napolo aŭtovojo.
Kune kun surrada transporto, alta rapideco ankaŭ alportis grandegajn avantaĝojn al MEP, al dungado, al turismo kaj al la nemoveblaĵa merkato en urbaj centroj, kaj ankaŭ al media daŭripovo kun signifa redukto de CO_2-emisioj.
Alta rapideco modifis la urbojn, la koncepton pri vojaĝado kaj pendolado, la vartransporton, kiu kun la lanĉo en novembro 2018 de la servo *Mercitalia Fast* fariĝis ĉiam pli rapida kaj orientata al klientaj bezonoj.
La AV ankaŭ kontribuis, kun milionoj da transportataj homoj, al la sukceso de gravaj eventoj.
La Alta Rapida Sistemo en Italio revoluciis la vivmanieron de la homoj kaj la moveblecon de la lando.
Ĝi ankaŭ kontribuis al la regenerado de grandaj urbaj centroj kaj apudaj urbaj areoj: spacoj konektindaj por renkontiĝi kaj vivi.
La novaj rapidrapidaj stacioj, desegnitaj de gravaj "*arkisteluloj*" selektitaj per internaciaj konkursoj, estas la centra elemento de la nova arkitekturo, kiu disvolviĝas kaj estos disvolvata en la urbaj areoj en kiuj ili estas lokataj.
Krom esti eblo por disvolviĝo, ili ankaŭ estas faktoro en la evoluo de konstruaĵoj en la serva sektoro (oficejoj kaj komercaj agadoj).
En Milano, ekzemple, laŭ la datumoj de *Nomisma*, la oficejoj ĉirkaŭ la stacioj Rogoredo kaj Porta Garibaldi registris, en 10 jaroj, pliiĝon de mezaj luprezoj respektive de 10,1% kaj 9,6%, kontraŭ meza totala falo de 20,5% en la lombarda ĉefurbo.
En Romo, en la sama periodo, la mezaj butikaj luprezoj falis entute je 24,1%, dum la malpliiĝo registrita en la areoj ĉirkaŭ la Tiburtina stacio estis de la 2%.
Torino Porta Susa, Reggio Emila AV Mediopadana, Bologna Centrale AV, Roma Tiburtina kaj *Napoli Afragola* ankaŭ redifinis la koncepton pri stacio mem.
La stacio ne plu estas loko nur por komenci aŭ fini vojaĝon, sed nova urba placo kie homoj povas renkontiĝi, butikumi kaj reakiri sian tempon.
La novaj stacioj, kelkfoje realaj artaĵoj, krom esti funkciaj por la homoj, estas motoro de rekvalifikado de la urba ĉirkaŭaĵo. □ *ViTo*

FS Italiane, l'Alta Velocità festeggia i 10 anni

Compie 10 anni l'Alta Velocità italiana, l'infrastruttura che ha cambiato il trasporto ferroviario del Paese.
L'Alta Velocità/Alta Capacità è stata la più grande opera infrastrutturale fatta in Italia nel dopoguerra, insieme alla autostrada A1 Milano-Napoli.
Insieme ai trasporti, l'alta velocità ha avuto enormi benefici anche su PIL, occupazione, turismo e mercato immobiliare dei centri urbani, oltre che per la sostenibilità ambientale con una forte riduzione delle emissioni di CO_2.
L'alta velocità ha cambiato le città, il

concetto di viaggio e di pendolarismo, il trasporto merci che, con l'avvio nel novembre 2018 del servizio *Mercitalia Fast*, è diventato sempre più rapido e orientato verso le esigenze dei clienti.

L'AV ha poi contribuito, con milioni di persone trasportate, al successo dei grandi eventi. In Italia esso ha rivoluzionato lo stile di vita delle persone e la mobilità del Paese ed ha anche contribuito alla rigenerazione dei grandi centri urbani e delle aree urbane limitrofe.

Spazi da connettere, riscoprire e vivere.

Le nuove stazioni dell'AV, progettate da importanti "*archistar*", selezionati in concorsi internazionali, sono l'elemento centrale della nuova architettura che si sta sviluppando e si svilupperà nelle aree urbane in cui sono inserite.

Oltre ad essere occasione di sviluppo sono fattore per la valorizzazione degli immobili del terziario (uffici e attività commerciali).

A Milano, ad esempio, secondo i dati di *Nomisma*, gli uffici attorno alle stazioni Rogoredo e Porta Garibaldi hanno registrato, in dieci anni, un incremento dei canoni medi, rispettivamente del 10,1% e del 9,6%, a fronte di un calo medio complessivo del 20,5% nel Capoluogo lombardo.

A Roma, nello stesso periodo, i canoni medi dei negozi sono complessivamente scesi del 24,1%, mentre il calo registrato nelle aree intorno alla stazione Tiburtina è stato di circa il 2%. Torino Porta Susa, Reggio Emilia AV Mediopadana, Bologna Centrale AV, Roma Tiburtina e Napoli Afragola hanno ridefinito anche il concetto stesso di stazione.

La stazione non è più solo un luogo dove iniziare o terminare un viaggio, ma una nuova piazza urbana dove incontrarsi, fare acquisti e riappropriarsi del proprio tempo.

Le nuove stazioni, in alcuni casi vere proprie opere d'arte, oltre ad essere funzionali per le persone sono elemento trainante per la riqualificazione del tessuto urbano circostante. □ *ViTo*

Italo EVO

Rubenruĝa kun la karakteriza ora leporeto, la nova motorunuo "Italo EVO" estis prezentita en 2016.

Evoluo de la Pendolino-familio, la trajno estas ekzemplo de alta rendimento kaj sinonimo de fidindeco kaj ankaŭ granda eleganteco.

La futureca nazo estis desegnita por garantii altan protekton al la lokomotivestro kaze de kolizio kaj pli bona aerodinamika efikeco.

Alia karakterizaĵo de "Italo EVO" estas ĝia trakcia sistemo, la sama kiu permesis al la "AGV 575" akiri (03/04/2007) la novan mondan rapidan rekordon sur relo je 574,8 km/h.

La 22 "Italo EVO" pliigos la floton de Italo-kompanio, alportante ĝin de la nunaj 25 motorunuoj al sumo de 47. La unuaj 4 eniris en servon ekde decembro 2017, perfekte integriĝante kun la 25 AGV jam en servo.

"Italo EVO" estas muntata en Italio, en la produktadaj centroj "Alstom" de "Savigliano" (CN), "Sesto San Giovanni" (MI), Bolonjo kaj en la deponejo "Nola" (NA), kiuj prizorgos ĝian bontenadon dum 30 jaroj, kiel ĝi jam faras por la "AGV Italo" trajnoj.

La trajno estas "verda", konstruita per reciklebla materialoj kaj desegnita laŭ ekologi-kriterioj por certigi reduktitan CO_2-emisiojn en la atmosfero. La trakcia distribuata sistemo pliigas efikecon

kaj regeneras energion dum bremsado.
Ĝi povas veturi je rapido de 250 km/h, estas longa 187 metrojn, konsistas el 7 vagonoj kaj gastigas 472 pasaĝerojn.
Ĝi kongruas kun la plej lastatempaj Teknikaj Specifoj pri intersistema funkciebleco (STI) 2014, komunaj kondiĉoj kaj teknikaj postuloj de Eŭropa Unio.
Prezenti ĉi tiujn novajn trajnojn hodiaŭ por Italo-kompanio estas bonega rezulto por la nuntempo kaj por la estonto, danke al ĉi tiuj novaj 17 trajnoj, la kompanio povos vastigi sian reton, pliigi la oftecon de siaj servoj kaj ĉiam oferti la plej bonajn vojaĝajn solvojn al ĝiaj pasaĝeroj.
"*Italo EVO*" estas parto de la familiaj trajnoj "*Avelia*", serio de grandaj kaj grandegaj rapidaj trajnoj de "Alstom".
La familio "*Avelia*" konsistas el 4 ĉefaj produktoj: *Pendolino, Euroduplex, AGV* kaj *Liberty*, kiuj reprezentas la sintezon de 35 jaroj da sperto kaj pli ol 1.050 trajnoj veturantaj en la mondo. □ *ViTo*

Italo EVO

Rosso rubino con il caratteristico leprotto dorato, il nuovo Italo EVO è stato presentato nel 2016.
Evoluzione della famiglia Pendolino, il treno è un esempio di prestazioni elevate e sinonimo di affidabilità oltre che di grande eleganza.
Il muso avveniristico è concepito per garantire un'elevata protezione al conducente in caso d'impatto e migliori prestazioni aerodinamiche.
Un'altra caratteristica di Italo EVO è rappresentata dal suo sistema di trazione, lo stesso che ha permesso all'AGV 575 di stabilire (03/04/2007) il nuovo record mondiale di velocità su rotaia a 574,8 km/h.
I 22 Italo EVO andranno ad accrescere la flotta di Italo, portandola così dagli attuali 25 treni a un totale di 47.
I primi 4 sono entrati in servizio da dicembre 2017, integrandosi perfettamente con i 25 AGV già in servizio.
Italo EVO è assemblato in Italia, nei centri di produzione *Alstom* di Savigliano (CN), Sesto San Giovanni (MI), Bologna e nel deposito di Nola (NA), che si occuperà per 30 anni della manutenzione, come già fa per i treni AGV Italo.
Il treno è "*verde*", costruito con materiali riciclabili ed è progettato secondo criteri di eco-sostenibilità per assicurare ridotte emissioni in atmosfera di CO_2.
Il sistema di trazione distribuita aumenta l'efficienza e rigenera energia in frenata. Potrà viaggiare alla velocità di 250 km/h, sarà lungo 187 metri, composto di 7 carrozze è ospiterà 472 passeggeri.
Il treno è compatibile con le recentissime Specifiche Tecniche di Interoperabilità (TSI) 2014, condizioni e norme comuni stabilite dall'Unione Europea.
Presentare oggi questi nuovi treni per Italo è un grande risultato per il presente e per il futuro, grazie a questi nuovi 17 treni, infatti, la società potrà ampliare la propria rete, aumentare la frequenza dei servizi e offrire sempre le migliori soluzioni di viaggio ai suoi passeggeri.
L'EVO per Italo fa parte della famiglia *Avelia*, la gamma di treni ad alta e altissima velocità di *Alstom*.
La famiglia *Avelia* si basa su 4 prodotti di punta: *Pendolino, Euroduplex, AGV* e *Liberty*, che rappresentano la sintesi di 35 anni di esperienza e più di 1.050 treni in servizio nel mondo. □ *ViTo*

Esperanto en universitatoj, fruktoj de modela kunlaboro.

En novembro 2018 sukcesplene oficialiĝis bonaj rilatoj inter Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), reprezentata de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio, kaj la Trafika Fakultato Jan Perner de la Universitato Pardubice (DFJK) per subskribo de kontrakto pri reciproka kunlaboro.

La kontrakto listigas plurajn motivojn, celojn kaj agadkampojn de la kunlaboro. La unua konkreta frukto de tiu kunlaboro estis la Faka seminario „Eŭropaj Fervojoj“, okazinta la 26-an de februaro 2019 en la prelegejo de la fakultato. Al la programo kontribuis ses fakuloj, membroj de IFEF, el kvin eŭropaj landoj. Post enkonduka prelego de la prezidantino de IFEF Rodica Todor (RO), kiu prezentis al la publiko IFEF kaj ĝiajn agadojn, jam sekvis fakaj prelegoj. Guido Brandenburg (DE) prezentis netradician solvon de la ĉeurba trafiko en Karlsruhe kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, Bodo Ehrlich (DE) klarigis la proceduron de la ekesto de teknikaj fervojaj normoj ene de EU, Ladislav Kovář (CZ) okupiĝis pri diagnoziko de moviĝantaj fervojveturiloj en Ĉeĥio, Jan Niemann (DK) prezentis la novan modernan fervojstacion Køge-Nord kaj Vito Tornillo (IT) la Bolognan stacion por altrapida trafiko.

La seminario celis ĉefe studentojn de la universitato, sed povis ĉeesti (kaj efektive ĉeestis) krome aliaj interesiĝantoj pri la evoluo de fervoja tekniko eksterlande, inter ili ankaŭ pluraj esperantistoj. Ĉiuj prelegoj estis tradukataj en la ĉeĥan, plenumitaj de Jaroslav Matuška kaj Ladislav Kovář.

Fine de la seminario Rodica Todor klarigis al la studentoj, kiuj eble ekinteresiĝos pri Esperanto, ke IFEF subtenas junajn esperantistojn - fakulojn, do ili povas peti subtenon por partopreni la IFEF-kongreson, kiu ĉi-jare okazos en la hispana urbo Malaga kaj ĉiu jare en diversa lando.

Kvankam estis prezentata multe da materialo certe malfacile digestebla en tiel koncentrita formo, la majoritato de la ĉeestantoj restis atentaj ĝis la lasta aplaŭdo.



De maldestre: dekano prof. Libor Švadlenka, Jaroslav Matuška (docento), Rodica Todor (IFEF-Pr.), Ladislav Kovář, Vito Tornillo.

Por la prelegintaj gastoj la tago ankoraŭ provizis viziton de la fervojfunkcia trejnokampo. Oni povis observi signalteknikaj aparatojn kaj plurajn generaciojn de ĉeĥaj regejaj sistemoj en funkcio, komutlevumiloj, regpaneloj, disponaj ekranoj. Kvankam miniatura oni povis konstati en reala tempo la kontrolon de enorma trakreto.

La sekvan tagon kelkaj reprezentantoj de IFEF estis akceptitaj de la fakultata dekano Libor Švadlenka, kun li oni postulis venontajn iniciativojn. □ *ViTo*

Esperanto in università, frutti di una collaborazione modello.

Nel novembre 2018, con successo, si è ufficializzata una buona relazione tra la Federazione Internazionale dei Ferrovieri Esperantisti (IFEF), rappresentata dall'Associazione Ceca dei Ferrovieri Esperantisti, e la Facoltà dei Trasporti "Jan Perner" (DFJK) dell'Università di Pardubice (Repubblica Ceca) con la sottoscrizione di un contratto di reciproca collaborazione.

Il contratto prevede diversi scopi, motivazioni e campi d'azione della collaborazione. Il primo concreto frutto di questa collaborazione è stato il seminario ferroviario „*Eŭropaj Fervojoj*" (Ferrovie Europee), tenuto il 26 febbraio 2019 nella sala conferenze della facoltà. Al programma hanno contribuito sei specialisti in materia, membri dell'IFEF, di cinque paesi europei.

Dopo l'introduzione della presidente dell'IFEF, Rodica Todor (RO), che ha presentato al pubblico l'IFEF e le sue attività, sono seguite le presentazioni dei temi.

Guido Brandenburg (DE) ha presentato "*Modello Karlsruhe, problemi e opportunità di tram su binari ferroviari*", Bodo Ehrlich (DE) ha chiarito "*Le procedure dell'introduzione delle norme tecniche ferroviarie all'interno dell'EU*", Ladislav Kovář (CZ) si è occupato di "*Diagnostica del materiale rotabile ferroviario durante la marcia, in Repubblica Ceca*", Jan Niemann (DK) ha presentato "*La nuova e moderna stazione ferroviaria Køge-Nord*" e Vito Tornillo (IT) "*La stazione Alta Velocità di Bologna*".

Il seminario era indirizzato principalmente agli studenti dell'università, ma potevano partecipare (come è stato) anche altri interessati alla evoluzione delle tecniche ferroviarie, tra cui anche diversi esperantisti.

Tutte le presentazioni sono state tradotte in ceco, da Jaroslav Matuška e Ladislav Kovář.



Prelegantoj kaj organizantoj de maldestre: Ladislav Kovář (ĈeFEA), Jaroslav Matuška (docento Jan Perner), Bodo Ehrlich, Guido Brandenburg, Roman Štěrba (OSŽ/FISAIC), Rodica Todor, Vito Tornillo, Jan Niemann

Alla fine del seminario Rodica Todor ha illustrato agli studenti, ai quali potrebbe interessare l'Esperanto, che IFEF sostiene i giovani esperantisti (con interessi ferroviari), con una sovvenzione per poter partecipare ai congressi IFEF; quest'anno si tiene nella città spagnola di Malaga, ogni anno in un Paese diverso.

Sebbene sia stato presentato molto materiale, certamente non facile da digerire in una forma così concentrata, la maggioranza dei presenti è rimasta attenta fino alla fine.

Per i conferenzieri e ospiti, la giornata ha riservato ancora una visita nel laboratorio sperimentale per il funzionamento ferroviario. Si sono potute osservare in funzione diverse generazioni di apparecchiature di comando a distanza degli impianti di stazione, dai banchi di comando di commutazione a leve, agli schermi dei sistemi computerizzati.

Seppure in miniatura, si è potuto constatare in tempo reale il controllo di una enorme rete di binari.

Il giorno successivo alcuni dei rappresentanti IFEF hanno fatto visita al decano della facoltà, prof. Libor Švadlenka, con cui sono state delineate le prossime iniziative. □ *ViTo*

Trieste: ekis intermodala servo de Cervignano al baltaj havenoj

Inaŭgurita nova akso intermodala inter "Cervignano" al Baltikaj havenoj per fervoja servo kiu kunligos la trafikhaveno de "Cervignano" al "Rostock", en Germanio.

La projekto estis realigita fare de la aŭstra entrepreno "LKW Walter", ĝi lokalizis la strukturon de "Cervignano" kiel ideala terminalo por la kunligo inter la germana haveno de "Rostock", referenca ŝiphaltejo por la vartrafiko al Skandinavio kaj al baltaj landoj, kaj la Nord-oriento de Italio.

La trajno, longa 550 metrojn kun 32 duonremorkoj, veturos 3 foje semajne ambaŭ direkte je la distanco de 1.300 km kaj la veturadtempo estos ĉirkaŭ 22 horojn.

La nova kunligo intermodala forigos el la ŝoseo ĉirkaŭ 200 kamionojn semajne, je avantaĝo de la subteneblo de la medio.

La servo estos bone bilanciata ĉu al eksporto, kun fina celo de la varo je Svedio kaj aliaj skandinaviaj landoj, ĉu al importo en la Nord-orienta Italio kaj Slovenio.

La trafikhaveno de "Cervignano" iĝas nodo pri la kontinenta vartrafiko laŭ la direktoj de la koridoro Adriatiko-Baltiko.

La nova servo eniriĝas, ĝenerale, kadre de sistemigo de la fervojaj kunligoj kaj de la logistikaj regionaj platformoj pri kiuj la "Aŭtoritato de Sistemo" daŭrigas kune kun la kontrolata agentejo "Adriafer".

Ĉi tiu servo reprezentas unu el la du partoj de la nova integratata sistemo de la Orienta Adriatika Maro. Ekde malmulte da tempo estis enkondukita navedon inter "Trieste" kaj "Cervignano".

Ekde nun oni povos vidi la plenan aktivadon de du regionaj terminaloj: je unu flanko "Cervignano" kaj je la alia "Villa Opicina".

Tiel "Cervignano" finfine denove estas kunligata kun la Eŭropo norde de la Alpoj. Ĝi estas moderna infrastrukturo

kiu povos ludi gravan rolon por la kompetitiveco de la entreprenoj kaj havenoj de la Nord-oriento de Italio.
Post pli ol 10 jaroj oni sukcesis rekunligi la trafikhavenon de "Cervignano" al la internacia fervoja reto per la trajno "Rostock-Cervignano".
Venonta celo estos kreskigi la frekvencon je 5 forveturoj semajne kaj evoluigi aliajn trajnojn. □ *ViTo*



Movo de konteneroj en Cervignano.

Trieste: al via il servizio Intermodale da Cervignano ai porti del Baltico

Inaugurato un nuovo asse intermodale da Cervignano verso il Baltico con un servizio ferroviario che collegherà l'interporto di Cervignano a Rostock, in Germania.
Il progetto è stato realizzato dalla azienda austriaca LKW Walter, che ha individuato nella struttura di Cervignano un terminale ideale per il collegamento tra il porto tedesco di Rostock, scalo di riferimento per il traffico merci diretto verso la Scandinavia e i Paesi baltici, e il Nord-est italiano.
Il treno, lungo 550 metri con 32 semirimorchi, percorrerà 3 volte alla settimana in entrambe le direzioni una distanza di 1.300 km e un tempo di percorrenza di circa 22 ore.
Il nuovo collegamento intermodale toglierà dalla strada circa 200 camion a settimana, a tutto vantaggio della sostenibilità ambientale.
Il servizio sarà ben bilanciato sia in *export*, con destinazione finale della merce Svezia e altri paesi scandinavi, che in *import* verso l'Italia nord-est e Slovenia.
L'interporto di Cervignano diventa snodo del traffico merci continentale sulle direttrici del corridoio Adriatico-Baltico.
Il nuovo servizio si inserisce, più in generale, in un quadro di messa a sistema dei collegamenti ferroviari e delle piattaforme logistiche regionali che l'Autorità di Sistema sta portando avanti con la controllata Adriafer.
Questo servizio rappresenta uno dei tasselli del nuovo sistema integrato del Mare Adriatico Orientale.
Da poco è stata avviata la navetta tra Trieste e Cervignano. Ora si inizia a vedere la piena operatività di due terminali regionali: da una parte Cervignano e dall'altra Villa Opicina.
Cervignano torna finalmente ad essere collegata con l'Europa al Nord delle Alpi. È una infrastruttura moderna che potrà giocare un ruolo importante per la competitività delle imprese e dei porti del Nord-est.
Dopo oltre 10 anni si è riusciti a riallacciare l'Interporto di Cervignano alla rete internazionale con il treno Rostock-Cervignano.
Gli obiettivi sono incrementare la frequenza a 5 partenze settimanali e qundi sviluppare ulteriori treni. □ *ViTo*

Triobla kongreso okazis en Malago, Hispanio

Antaŭ 110 jaroj okaze de la 5-a Universala Kongreso en Barcelono IFEF-antaŭuloj iniciatis la unuajn paŝojn de kunlaborado inter esperantistoj fervojistoj. IFEF ĉi-jare kongresis en Hispanio, en urbo Malago, ĝuste por festi sian jubileon en la sama lando kie ĝi naskiĝis.

La IFEF kongreso okazis sub la patroneco de FISAIC, kies Prezidanto, pro neĉeesto, sendis gratulan leteron.

La 71-a IFEF kongreso estis organizita kune kun la kongresoj de Hispanio (nacia) kaj de Andaluzio (regiona). Aliĝis ĉirkaŭ 180 homoj el 25 landoj, eĉ ekstereŭropaj (Ĉinio, Japanio, Suda Koreio, Brazilo, Meksikio). La kongresejo estis tre konvena por la aranĝo, bone ekipita per salonoj kun teknikaj instalaĵoj, ankaŭ la loĝĉambroj estis komfortaj kaj silentaj. Jes, silentaj ĉar la strukturo estas parto de monaĥejo kun seminario, kaj malgranda preĝejo, lokata en la alta parto de la urbo ene de bela parko kun bela vegetaĵaro.

La elekto de samtempaj kongresoj estis farita por kunigi fortojn kaj doni al la partoprenantoj internacian etoson. La solena inaŭguro okazis en la granda salono de la kongresejo, sur la podio ĉeestis la prezidantoj de la koncernaj asocioj, IFEF - HEF - AEU - LKK, la reprezentantoj de UEA kaj la urba skabenino pri kulturo. Post bonvenigaj salutvortoj de eminentuloj kaj de estroj de la partoprenantaj landoj kaj post disdono de honoraj diplomoj, la prezidantino Rodica Todor per mallonga parolado deklaris malfermita la kongreson.

La programo estis riĉa kaj abunda kun samtempaj okazaĵoj. Krom la organizaj laborkunsidoj kaj plenkunsidoj de ĉiuj asocioj, okazis prelegoj fervojfakaj kaj ĝeneralaj. Temoj de la fakaj prelegoj estis ekzemple: "*Hyperloop*" en Hispanio, la konstruo de grandrapida fervojlinio en Sauda Arabio de Medino al Meko kaj la historio de malaga fervojo. Okazis ankaŭ ne fervojaj prelegoj, konformaj al la kongresa temo "Enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon ĉe Eŭropa Unio". Por IFEF estis elekta jaro, la nova estraro por la venontaj 3 jaroj estis elektita kun konfirmoj kaj unu nova eniro.

Komencantoj havis eblon sekvi E-kurson kaj komencintoj povis progresi en la parolado, aliaj elprovi sin en la KER ekzamenoj de UEA.

La partoprenantoj ĝuis la sunon de la suda hispana urbo. La bela vetero permesis ekskursi sen probleme al diversaj interesaj cellokoj pri kiuj la organizantoj bone planis la vizitojn: al la urbocentro kaj al botanika ĝardeno de Malago, al urboj Granado, Rondo, Antekero, Kordovo kaj Zafarajo. Ĉi-lasta estis faka ekskurso. Post aŭtobusa atingo de la altebenaĵo oni trovis malgrandan fervojlinion kun vagonareto tirata per malgranda vaporlokomotivo. La veturdaŭro estis je ĉirkaŭ 30 minutoj tra belega natura pejzaĝo.

La vespera kultura programo ofertis al la ĉeestantoj altnivelajn prezentaĵojn pri loka kulturo kun arĉorkestro "Koncerto Malaga", "Rocìo Alba" kun kantoj kaj dancoj en la flamenka stilo, esperanta kaj internacia kulturo per teatraĵoj, poemoj, kantoj, en Esperanto, el Italio, Nederlando, Serbio kaj el la tuta mondo.

La fermoj okazis en du diversaj tagoj,



Vaporlokomotiveto al Zafarajo

tiuj de la hispana kaj de la andaluzia dimanĉe, tiu de IFEF marde.
Per transdono de la IFEF-flago al germanaj kolegoj la kongreso ĉesis sed ankoraŭ ne finiĝis. La programo daŭris ankoraŭ du tagojn kun ekskursoj, por kelkaj kongresanoj aldone ĝis la sekva lundo kun postkongresa ekskurso al norda Maroko.
LKK-anoj de la 72-a IFEF-kongreso prezentis al la publiko la venontan kongresurbon per lumbildoj kaj historiaj klarigoj. Ankaŭ venontjare la kongreso estos triopa, ĝi okazos en duŝtata urbo ligita per pontoj: Frankfurt ĉe Oder kaj Słubice, en germana kaj pollanda teritorioj.
Do en ĝi kongresos IFEF, Germanio kaj Pollando. La dato estas de la 29-a de Majo ĝis la 5-a de Junio 2020. La komuna kongresa temo tial estas "Najbaroj", la kongresa nomo "Transponta Kongreso" mallonge "TRAKO".
Fine ĉiuj esperantistoj adiaŭis per "ĝis revido la venontan jaron"! □ *ViTo*



Foto de la partoprenantaro en Malago

Un triplo congresso si è tenuto a Malaga, Spagna

110 anni fa in occasione del 5° Congresso Universale di Esperanto a Barcellona i precursori dell'IFEF (Federazione Internazionale dei Ferrovieri Esperantisti) iniziarono i primi passi di collaborazione tra i ferrovieri esperantisti. IFEF quest'anno ha avuto il suo congresso in Spagna, nella città di Malaga, giusto per festeggiare il suo giubileo nello stesso Paese dove nacque nel 1909.

Il congresso IFEF si è svolto col patrocinio della città di Malaga e della FISAIC (federazione internazionale per la cultura dei dopolavoro ferroviari), il cui presidente non potendo partecipare ha inviato una lettera di congratulazioni.

Il 71° congresso IFEF è stato organizzato assieme ai congressi Spagnolo (nazionale) e Andaluso (regionale). Hanno partecipato circa 180 persone da 25 Paesi, persino extraeuropei (Cina, Giappone, Sud Corea, Brasile, Messico). La sede del congresso si è dimostrata adatta per l'evento, bene attrezzata con vari saloni con installazioni tecniche, anche le camere erano confortevoli e silenziose. Sì, silenziose! poiché la struttura è parte di un monastero con seminario e una chiesetta, situato nella parte alta della città all'interno di un parco con bella vegetazione.

La scelta dei tre congressi contemporanei fu fatta per unire le forze e dare ai partecipanti un'atmosfera internazionale. L'inaugurazione solenne è stata fatta nel grande salone della struttura congressuale, sul podio c'erano i presidenti delle relative associazioni, IFEF - HEF - AEU - LKK (comitato organizzatore), i rappresentanti dell'UEA (Associazione Universale Esperanto) e l'assessora alla cultura della città. Dopo i saluti di benvenuto da parte delle autorità e dei rappresentanti dei Paesi partecipanti e dopo la consegna dei diplomi onorari, la presidente IFEF Rodica Todor con un breve discorso ha dichiarato aperto il congresso.

Il programma è stato vario e abbondante con alcuni eventi svolti in contemporanea. Oltre ai lavori organizzativi di tutte le associazioni con convegni e assemblee, si sono effettuate conferenze tecniche ferroviarie e di carattere generale. I temi di alcune conferenze tecniche sono stati: "*Hyperloop*" in Spagna, la costruzione della linea ferroviaria alta velocità in Arabia Saudita da Medina alla Mecca e la storia della ferrovia di Malaga. Ci sono state anche conferenze non ferroviarie, conforme al tema del congresso: "*Inserimento dell'Esperanto come lingua ufficiale nell'Unione Europea*". Per l'IFEF è stato anche anno di elezioni, il nuovo direttivo per i prossimi 3 anni è stato eletto con conferme e un nuovo ingresso.

I principianti hanno avuto la possibilità di seguire un corso base di Esperanto, altri hanno seguito un corso di perfezionamento nel parlato, alcuni si sono cimentati negli esami KER con obiettivi posti dall'UEA.

I congressisti hanno potuto godere del sole della città del sud della Spagna. Infatti il bel tempo ha permesso che le gite si svolgessero senza alcun problema.

Diverse e interessanti le località per le quali gli organizzatori avevano bene programmato le visite: al centro storico



La nova IFEF-estraro (de maldestre): Sk V. Tornillo, Pr R. Todor, Rd L. Kovář, PrFK J. Niemann, Ks L. Vignaud.

e giardino botanico di Malaga, alle città Granada, Ronda, Antequera, Cordova e Zafarraya. In quest'ultima la gita è stata "tecnico ferroviaria". Dopo aver raggiunto in autobus l'altopiano di Ventas di Zafarraya, ci siamo trovati di fronte ad una piccola linea ferroviaria con vagoncini tirati da una minuscola locomotiva a vapore. Il viaggio su questo trenino è durato una trentina di minuti tra un bel paesaggio con vista verso il mare e natura.

Le presentazioni culturali serali hanno offerto ai presenti programmi di alto livello: per la cultura locale con l'orchestra di archi del teatro di Malaga "Concerto Malaga"; la cantante "Rocìo Alba" con canti e danze nello stile flamenco; cultura esperantista e internazionale con teatro, poesie e canti, in Esperanto, da Italia, Olanda, Serbia e da tutto il mondo.

Le chiusure dei congressi sono state fatte in due diversi giorni, quelli spagnolo e andaluso la domenica, quello dell'IFEF il martedì. Con la consegna della bandiera dell'IFEF ai colleghi tedeschi il congresso si è chiuso, ma non ancora finito. Il programma è continuato ancora per due giorni con gite, per alcuni congressisti in aggiunta c'è stato, fino al lunedì successivo, un post congresso in nord Marocco.

Gli organizzatori del 72° congresso IFEF 2020 hanno presentato al pubblico la prossima città del congresso con la proiezione di foto e informazioni storiche.

Anche il prossimo anno il congresso sarà triplo, avverrà in una città (unica) di due Stati confinanti, divisa dal fiume Oder, ma unita per mezzo di ponti: Frankfurt am Oder e Słubice, in territorio tedesco e polacco. Quindi lì ci saranno il congresso internazionale IFEF e quelli nazionali di Germania e Polonia, dal 29 Maggio al 5 Giugno 2020. Il tema congressuale comune perciò è "*Vicinato*", il nome del congresso "*Transponta Kongreso*" (Congresso Oltre il Ponte) in breve "*TRAKO*".

Alla fine della settimana tutti gli esperantisti si sono salutati con "Ĝis revido la venontan jaron"! "Arrivederci al prossimo anno"! □ *ViTo*



Trans-dono-preno de la IFEF flago:
de Malago al Frankfurt am Oder - Słubice.

Vita dell'IFEA

Il numero dei soci IFEA è stazionario: cosa positiva; purtroppo l'alta età media e la locazione in città diverse non favoriscono iniziative e partecipazioni. Il segretario, anche segretario IFEF, mantiene i contatti locali e internazionali.
In febbraio, in via sperimentale, l'IFEF ha promosso una serie di conferenze ferroviarie presso la facoltà dei trasporti dell'università di Pardubice, Rep. Ceca.
I relatori sono stati alcuni consiglieri della Commissione Tecnica (Faka Komisiono) ognuno ha presentato un tema ferroviario circa il proprio Paese. Sono intervenute 30 persone tra cui 8 studenti della facoltà.
L'incontro è stato patrocinato dal "DLF" ceco, il cui presidente ha partecipato e fatto gli auguri di benvenuto.
Si è tenuto anche l'estrarkunsido IFEF.
Inizio maggio: IFEF congresso Malaga (vedi articolo). Molto successo, in particolare perché in accordo con lo spagnolo e l'andaluso. Foto, video e articoli sono apparsi in rete e su diverse riviste delle landaj asocioj e sul ripristinato *Tempo Libero* del DLF Bologna, ma anche su *El Popola Ĉinio* e, in rete, su pagine di FISAIC e UIC. L'*Esperanto* UEA l'ha messo perfino in copertina.
Naturalmente il segretario ha partecipato, ed essendo anno di elezioni è stato rieletto per i prossimi tre anni.
Il prossimo congresso IFEF avrà luogo in Germania, a Frankfurt am Oder e Slubice in Polonia, città di confine divisa dal fiume Oder. Anch'esso sarà triplo, assieme a quello tedesco e polacco, dal 29 maggio 2020. Informazioni e aliĝilo su: http://ifef.free.fr/spip/.
La socia Madella ha insegnato (oltre a Parma) a una decina di ragazzi anche a Bologna nell'Istituto Salesiani, dove il 4/7 alcuni hanno sostenuto e superato con successo gli esami di 1° grado.
La commissione esaminatrice era composta da Bolognesi (presidente), Madella e Tornillo.
La prevista assemblea IFEA di marzo per diverse cause non si è tenuta. Troveremo un momento di disponibilità comune. Il bilancio 2018 è stato chiuso senza alcun problema economico.
A settembre, al DLF di Bologna, concerto della cantautrice Chiara Raggi, che presenterà il suo album in Esperanto *Blua Horizonto*. Bella occasione per gli esperantisti locali e i non esperantisti, a cui sarà proposto un corso di E-o.
I contatti locali e internazionali proseguono in rete; il segretario gestisce le pagine IFEF e FEI su *Face Book* ed aggiorna le pagine di alcuni siti. Sono stati creati una *Bitoteko* italiana, dove collocare le riviste fatte in Italia (http://www.bitoteko.it/items/browse?collection=5); finora vi sono 50 numeri di *Itala Fervojisto* e un *Bitarkivo* di collezioni internazionali; anche qui vi sono gli *Itala Fervojisto* dal 1977 a oggi e alcuni numeri dal 1951; alcuni numeri mancanti sono in via di scansione (https://www.bitarkivo.org/gazetoj/italafervojisto).
In *Bitarkivo* ci sono, grazie al segretario, anche numeri dal 1909 al 1930 di *Fervoja Esperantisto* e *La Fervojisto* dell'IFEF; presto ci saranno tutti gli *Internacia Fervojisto*. Presenti anche riviste di altre *Landaj Asocioj* di IFEF.
Integrato anche l'archivio, presto in rete, della Biblioteca Nazionale di Vienna spedendo numeri cartacei mancanti di *Itala Fervojisto*. □ *(ViTo)*



CHI PER PRIMO … ?
KIU UNUE … ?

Carrozza ristorante

Nel 1863 sui treni fra Baltimora e Filadelfia (USA) entrarono in servizio due carrozze ristorante. In origine erano normali vagoni modificati per quell'uso.

Restoracia vagono

En 1863 en la trajnoj inter Baltimoro kaj Filadelfio (USONO) ekfunkciis du restoraciaj vagonoj. Origine ili estis normalaj vagonoj modifitaj por tiu uzo.

Doccia sul treno

Nel XIX sec. su alcune carrozze per persone importanti vennero installati dei bagni, probabilmente anche docce. Per i comuni passeggeri paganti le docce furono predisposte per la prima volta sui treni nel 1918, sulla prima linea transaustraliana, tra Perth e Port Augusta. Le docce erano installate nelle carrozze letto. Carrozze con docce per ogni compartimento a due letti furono allestite sul treno tra Melboune e Adelaide a cominciare dal 1950, ma i passeggeri delle cuccette singole avevano la scomodità di dover andare fino in fondo al corridoio per farsi la doccia. Le docce su carrozze con posti a sedere furono introdotte sul treno fra Adelaide e Alice Springs nel 1980.

Duŝo en la trajno

En la XIX jc. en iuj vagonoj por gravuloj estis instalitaj banejojn, eble duŝojn. Por la ordinaraj pagantaj pasaĝeroj duŝoj estis starigitaj la unuan fojon sur la trajnoj en 1918, sur la unua transaŭstralia linio, inter Perto kaj Port Augusta. La duŝoj estis en la litvagonoj. Vagonoj kun duŝoj por ĉiu dulita kupeo estis starigitaj en la trajno inter Adelajdo kaj Melboune ekde 1950, sed la pasaĝeroj de unulitaj kuŝejoj havis la ĝenon laŭiri la tutan koridoron por sin duŝi. La duŝoj en la vagonoj kun sidlokoj estis enkondukitaj sur trajno inter Adelajdo kaj Alice Springs en 1980.

Contachilometri

Congegni per misurare i percorsi erano usati in Egitto intorno al 200 a.C. Funzionavano con un sistema di riduzione a ingranaggi, per cui la ruota dentata del contatore compiva un'intera rivoluzione dopo varie centinaia di rivoluzioni della ruota principale del veicolo. Ogni 1.600 m circa cadeva un sassolino e alla fine del viaggio il loro numero mostrava la via percorsa. Un sistema simile, usato nel I secolo a.C., consisteva in sassolini scendenti lungo un tubo sotto il veicolo e producenti un tintinnio contro una superficie di bronzo, così indicando che era stato percorso circa un miglio.

Odometro

Mekanismoj por mezuri la itinerojn estis uzataj en Egiptio ĉirkaŭ 200 jaroj a.K. Ili funkciis per redukta ilaro, en kiu la odometra dentrado elfaris tutan revolucion post kelkcent revolucioj de la veturila rado. Je proksimume 1.600 m falis ŝtoneto kaj fine de la vojaĝo ilia nombro montris la vojlongon. Simila sistemo, uzata en la I jc. a.K. konsistis en malgrandaj ŝtonoj falintaj tra dukton sub la veturilo kaj tintantaj kontraŭ bronzan surfacon, tiel indikante ke estis veturita ĉirkaŭ unu mejlon.

Slitta

Il primo sistema per ridurre l'attrito nello spostamento di un veicolo non è la ruota, ma la slitta. Un paio di esemplari di slitta trovati a *Heinola*, in Finlandia,

sono stati datati approssimativamente all'VIII millennio a.C. Erano di legno, avevano la forma di sci e dimostrano che nell'Europa del Nord questo sistema di trasporto risale a più di 10.000 anni fa, in un periodo della preistoria in cui le aree coperte di ghiaccio erano assai più ampie di quelle attuali. Gli sci risalgono probabilmente alla stessa epoca e forse furono essi a dare l'idea della slitta.

Sledo

La unua sistemo por redukti frotadon en la veturmovo ne estas la rado, sed la sledo. Paro de specimenaj sledoj trovitaj en *Heinola*, Finnlando, estis datitaj proksimume je la VIII jm. a.K. Ili estis el ligno, kun skia formo kaj montras ke en Norda Eŭropo tiu transportsistemo datiĝas je pli ol 10.000 jaroj, dum antaŭhistoria epoko kiam la glaci-kovritaj areoj estis multe pli vastaj ol la nunaj. La skioj verŝajne datiĝas el la sama epoko kaj eble estis ili kiuj donis la ideon de la sledo.

Carrozza a vela

Probabilmente il vento non sarà mai molto adatto a far muovere i veicoli su ruote, ma la storia di invenzioni che sfruttano questo principio è lunga e va dall'Europa alla Cina. *Gao Dsarng Wu Shu* fu l'inventore cinese della prima carrozza a vela, che costruì nel 550 circa. Pare che questa carrozza potesse portare 30 persone e facesse più di 160 km al giorno. La notizia va considerata con un certo scetticismo perché, anche se l'impresa è tecnicamente possibile, è difficile pensare che ci fossero strade adatte a permettere le manovre necessarie a prendere il vento per un veicolo così grande. L'invenzione di Gao fu probabilmente più una curiosità scientifica che una realizzazione pratica.

Velvagono

Eble la vento neniam estos tre taŭga por movi veturiloj sur radoj, sed la inventhistorio, kiu ekspluatas tiun principon estas longa kaj iras de Eŭropo ĝis Ĉinio. *Gao Dsarng Wu Shu* estis la ĉina inventisto de la unua velĉaro, kiun li konstruis ĉirkaŭ en 550. Ŝajnas ke ĉi tiu ĉaro povis porti 30 homojn kaj laŭiris pli ol 160 km tage. La noticon oni devas rigardi kun iom da skeptikeco ĉar, eĉ se la tasko teknike eblas, estas malfacile pensi ke ekzistis vojoj kiuj permesus la manovrojn postulataj por kapti la venton por tia granda veturilo. La Gao-invento eble estis pli scienca kuriozaĵo ol praktika realigo.

Carriola

La carriola fu inventata in Cina durante la Dinastia Harn (206 a.C.-220 d.C.) e all'inizio veniva usata per il trasporto militare e uso civile. Allora, come ora, la carriola cinese aveva una sola grande ruota direttamente sotto il carico, invece che sul davanti, come le nostre. È strano che il modello cinese non sia stato adottato nel resto del mondo, perché chi usa quella carriola non deve sollevare il peso del carico.

Ĉarumo

